

Historio de Sicilio

Sicilio fascinis min jam dum mia junaĝo. Pro tio en 1964 – 19-jaraĝa – mi faris petveturan vojaĝon de Germanio ĝis tiu insulo.

Traveturinte Aŭstrion kaj tutan Italion, bedaŭrinde mi ne havis tempon por ekkoni multajn lokojn, sed mi vizitis la du plej grandajn urbojn – Palermon kaj Katanion – kaj Sirakuzon. Nun, post 55 jaroj, mi kaj mia edzino faris aŭtomobile rondvojaĝon, dum kiu mi povis revidi kelkajn vizitindaĵojn kaj ekkoni plurajn aliajn.

Kial Sicilio fascinis min? Pro ĝia multkultura heredaĵo – kiun oni perceptas legante ĝian historion.

En la E-Vikipedio troviĝas longega artikolo pri Sicilio, inkluzive de parto pri ĝia historio. Por ĉi tiu Esperanta-RetRadio-artikolo mi elektis nur kelkajn bazajn informojn.

La plej malnovaj homaj spuroj eltrovitaj sur la insulo verŝajne venas el la 13-a jarmilo a.K. [...] La homa ĉeesto en la regiono de Palermo estas atestita ekde la pratempo per la grafitioj kaj la kavernaj pentraĵoj de la groto Adaŭro: dancantaj figuroj per magia rito, eble "ŝamanoj" de neidentigita popolo kiu vivis en la insulo. [...] Elfosadoj en Lipari produktis taŭgajn pruvojn de civilizacioj, kiuj ekde Neolitiko (6-a jarmilo a.K.) [...] koloniigis la insulon. [...] Tamen, la identeco aŭ deveno de la unuaj loĝantoj de la insulo ankoraŭ ne estas klara. [...]

La ĉefurbo sicilia estis fondita kiel havenurbo fare de la fenicaj kolonianoj de Tiro (hodiaŭa Libano) ĉirkaŭ 734 a.K. [...] En la 6a jarcento la okcidenta marbordo de la insulo apartenis al la kartaganoj [...].

Sicilio eniris pli grave en la historion dum la greka koloniado, kiu komenciĝis per la fondiĝo de Naxos fare de la ĥalkidoj kaj Sirakuzo de la korintanoj, meze de la 8-a jarcento. (Proksimume samtempe kun la fondiĝo de Palermo) [...]

La civilizo de la posteuloj de grekoj loĝintaj en Sicilio estas analoga al tiu de Grekio mem. [...] La landa aristokrataro ĝenerale konservis potencon ĝis la mezo de la 6-a jarcento [...]. Post la periodo de aristokrata hegemonio estis la lukto inter la aristokratio kaj la popolo, celante akiri egalecon antaŭ la leĝo [...] La opozicio al la aristokrataro favoris, kiel en Grekio, la kreskadon de la tiranoj, kiuj ĉirkaŭ 500 a.K. atingis la potencon en preskaŭ ĉiuj sicili-grekaj urboj.

Sicilio estis, kiel Magna Graecia [Granda Grekio], centro de greka kulturo: Arkimedo, Karondo, Empedoklo, Epikarmo, Gorgio, Sofrono kaj Stesikoro estas menciitaj. La arta florado estis bonega, precipe pri religia arkitekturo. Inter la fino de la 7-a jarcent kaj la komenco de la 6-a, la unuaj temploj ekestis, ekzemple, en Sirakuzo kaj Agriĝento [...]

Post la Unua punika milito (264-241 a.K.) la insulo estis subigita al Romo [kaj] fariĝis ĝia unua romia provinco. [...] Koncerne al la ekonomia-produktema sfero, la sicilia teritorio estis grandskale kulturata per tritiko por provizi Romon, ĝis la punkto difini Sicilion mem kiel grenejon de Romo. [...]

Sicilio ĝuis relativan bonfarton ĝis la tempo de Marko Antonio, sed en la 3-a jarcento ĝi partoprenis la ĝeneralan procezon de ekonomia kaj politika dekadenco de la Romia

Imperio. [...] Ĉirkaŭ la mezo de la 5-a jarcento la vandaloj de Genseriko, establitaĵoj en Afriko, ekprenis la insulon.

[Poste] La insulo restis dum tri jarcentoj sub bizanca dominado. [...] La posta malintegriĝo de la Bizanca Imperio kaj ĝia malforto stimulis fortan malkontenton en Sicilio, tiel inter 663 kaj 668 la imperiestro de la Oriento Konstanto la 2-a translokiĝis la ĉefurbon de la imperio el Konstantinopolo al Sirakuzo, sed anstataŭ alporti profitojn al Sicilio kaj al la Imperio, ĝi kaŭzis longan militon inter la du urboj.

[En 827 la araboj komencis okupi la insulon. La okupado daŭris ĝis 965.] Dum jarcentoj diversaj faktoroj certigis la superregadon de la islamanoj en Sicilio: la efikeco de ilia administra, fiska kaj ekonomia sistemoj [...], la forto de militaj strukturoj [...], la politika divido de la italaj potencoj kaj la senpoveco de la diversaj kristanaj regantoj.

Kiel mi diris pasintan semajnon, normanaj militistoj konkeris la insulon ekde 1061, kaj la normanoj regis ĝin ĝis 1194, kiam komenciĝis la regado de la germana dinastio Hohenstaufen. Sekvis franca, hispana kaj alia franca dinastioj (Anĵuo, Aragono, Burbono), sed tio estas tro longa historio.

Alloga fakto estas, ke sur la insulo oni povas viziti kelkajn grandajn antikvajn grekajn teatrojn (en Sirakuzo kaj Taormino), malmultajn grekajn templojn (en Agriĝento) kaj romiajn amfiteatrojn (en Sirakuzo kaj Katanio), la jam menciitajn konstruaĵojn en araba-bizanca-normana stilo kaj sennombrajn belegajn barokajn preĝejojn kaj katedralojn.